Wilhelm Müller,

# La vaglumo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Logis en profundan lokon
Erariga lumo min:
Ĉu mi trovos elirejon?
Mi ja ne atentas ĝin.

Kutimiĝis mi erari
Havas celon ĉiu kur':
Niaj ĝojoj kaj doloroj,
Ĉio estas ŝajno nur.

Tra la val' senhalte migras
Suben mi kun kalma kor' –
Ĉiu flu' atingos maron,
Sian tombon la dolor'.

*Traduko de la Germana poemo "Das Irrlicht" de* Wilhelm Müller *(∗1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2007-01-29.*

*MR-455-1 / Arg-807-1619 (2013-01-31 22:53:53)*

*Vidu ankaŭ:* http://eo.wikipedia.org/wiki/Wilhelm_M%C3%BCller.